Ponteto

(Bulteno de Esperanto- Ligo en Regiono Kantoo)
Julio 2012　N-ro 253

連盟会長　水野義明さんご逝去

関東エスペラント連盟会長の水野義明さんが、6 月 17 日 15:03 にお亡くなりになりました。5 月 13 日に入院、その後病状は回復することなく、最後は肺炎が悪化しお亡くなりになりました。

通夜が 23 日に、告別式が 24 日に、所沢市斎場で行われ、多くのエスペラント関係者が最後のお別れをいたしました。

水野さんは、1987 年から関東連盟の会長として、運動の発展に貢献され、連盟にとってはなくてはならない存在でした。奇しくも、第 61 回関東大会が成功裏に終わったその日に、お亡くなりになりました。ご冥福をお祈りいたします。

水野義明先生への弔辞

関東エスペラント連盟事務局長　堀泰雄

水野先生。「第 61 回関東エスペラント大会は、とても盛大に、大成功のうちに終了しました。」こんなふうに報告しようと思っていたのに、その大会のさなかにお亡くなりになられていたとは。先生は、1987 年から 25 年もの間、関東連盟の会長でしたから、大会の成功を感じて、すっかり安心してしまったのでしょうか。

先生は、関東大会記念品として多くの本を出してきました。先生の著作を分類すると、3 つになります。一つは、エスペラントの言語面での書物の翻訳で、『言語の発展―国際語エスペラントの観点から』と『国際共通語の探究―歴史・現状・展望』がこれに当たります。2 つ目は、『エスペラントの創始者ザメンホフ』と『エスペラントの娘リディア・ザメンホフの生涯』の翻訳です。これらの翻訳は、英語が堪能であるだけでなく、諸言語に広く精通した、水野先生でなければ出来ない仕事でした。なかなか原文では読めないなかで、これらの著作は、日本のエス

Leteroj de Tigro (4)

3an Julio, 2012

Tagoj de demonstracioj

En la tri landoj - Honkongo/Ĉinio, Kanado kaj Japanio, en kiuj mi traloĝadas, okazis plimalpli dum la sama tempo grandaj amasiĝoj de homoj, tamen pro tre malsamaj kialoj. Homoj grandnombre amasiĝas, kiam ajn ili volas esprimi ion, kion ili ne povus esprimi kiel individuoj.

Honkongo

La demonstracio, kiu okazis la 1an de julio en Honkongo, havas historion 15-jaran, ekde 1997 kiam Ĉinio ekregis Honkongon. Komence, la temo rilatis al demokratiiĝo kaj homaj rajtoj en Ĉinio, sed pli kaj pli multaj honkonganoj volas esprimi siajn malkontenton pri la

nova honkonga registaro. Laŭ la organizantoj, ĉi-jare pli ol 400,000 honkonganoj partoprenis, sed laŭ la polico, nur 63,000.

Mi neniam partoprenas demonstraciojn en Honkongo, ĉar mi plej ofte loĝas eksterlande kaj ĉiam maltrafas la okazojn. Tamen, mi devas konfesi, ke mi ne havas grandan emon partopreni, ĉar en Honkongo mi ĉiam havas fobion pri homamaso. Ne nur homamaso kaŭzas ĥaoson trafikan en la insuleca landeto, la organizado de demostracioj estas ofte hazardeca pro manko de spertoj. Ne forgesu, ke "demokration" honkonganoj ekĝuis nur kelkajn jarojn tuj antaŭ la reveno de Honkongo al Ĉinio, kiun la brita kolonia registaro subite donis al honkonganoj post jarcento de koloni regado. Se oni demandus al tiuj partoprenantoj pri la kialoj de ties partoprenado, plej ofte estas nur malkontento - "la registaro estas malbona", "politikanoj mensogas", "mi ne gajnas sufiĉe da mono", "la apartamentoj estas tro multekostaj". La ironio estas, ke Honkongo estas ankoraŭ unu el la plej prosperaj kaj sekuraj lokoj en la mondo. Eble post iom da tempo, honkonganoj povus ekkonstati la fakton, ke politikanoj ĉiam mensogas kaj la prospereco ne estas eterna fakto. Post esprimado de malkontento, pliutilas ektrovi solvojn.

Tokio

Samtempe en Tokio okazis demonstracio kontraŭ atomenergio. Laŭ iu organizanto partoprenis pli ol 150,000 sed la polico taksis nur 17,000. Supozeble ĝi estas unu el la plej grandaj en la japana historio ekde 1960. La rekomencado de la atomcentraloj kolerigis multajn japanojn, kiuj perdis sian fidon pri ili post la tragedio de Fukuŝima lastjare. En Kioto, kie mi nun loĝas, amikoj ankaŭ invitis min partopreni malgrandskalan demonstracion. Kiel eksterlandano mi komence hezitis, sed mi certe subtenas morale, ĉar sennuklea mondo estas pli sekura por ĉiuj. Eble elektro-kotizo altiĝos. Eble la ekonomio suferos. Sed ĉu ne pligravas, ke ni vivu?

Kanado

Registaroj ĉiam timas pri tiaj homamasiĝoj, ĉar ili ne nur indikas socian malstabilecon, sed ankaŭ pliintensigas tion. Sed en Toronto, Kanado, kie mia familio loĝas, okazas alitipa homamasiĝo - la “Samseksama Parado”. Ĝi komenciĝis ekde la 70aj jaroj kiel demonstracio kontraŭ diskriminacio, sed iel ĝi disvolviĝis kaj nun fariĝas granda festo, kiu allogas milionon da turistoj ĉiujare. Miaj gepatroj ŝerce diras, ke ankaŭ ili volas partopreni, ĉar ĝi ŝajnas tre amuza. Interalie, la urba registaro tre entuziasme subtenas la eventon, kiun prosperigis la urbon pere de enspezo de milionoj da dolaroj!

Antaŭ jaroj en Herzberg, la “Esperanto Urbo”, ankaŭ mi partoprenis Esperanto-Paradon. Sed pri tiu sperto, iom tro stranga, mi rakontu alian tagon.

Kara amiko, ĉu vi preferus resti hejme komforte, aŭ ŝvite ĝuus la kamaradecon de gesamideanoj?

- Tigro (*bill.m.mak@gmail.com*)

>>>